Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Aŭstrio. — Telefono U 23-1-80

5-a jaro JULIO/AŬGUSTO 1950 n-ro 7-8

K a r a j g e s a m i d e a n o j !

Nia kongreso pasis, ĝi estis impona revuo pri la pasinta agperiodo kaj impresa manifestacio pri nia movado. Ĉerpu ni el tiu grava Esperantista okazaĵo de nia lando pluan inspiron por pli intensa persisto, por pli intensa energio kaj por pli entuziasma dediĉo al la lumcelo de Zamenhof. Estu ĝi por ĉiu el ni plua instigo por streĉi ĉiujn niajn fortojn por la plejkaraĵo, kiun la homo posedas - p o r l a P A C O !

Ni por ĉiam enkorigu la vortojn de nia Viena urbestro Körner: "Ne perdu la kuraĝon, se vi havas firman konvinkon! Prediku en la dezerto! Se la homoj kapablos kompreni sin reciproke, ankaŭ la paco estos garantiita!"

* * *

Kaj tamen ĝi sin movas ...

Pri 'movado' mi volas paroli al vi; pri movado ĝenerale kaj mi atentigas vin pri vortoj fame konataj en ĉiu lingvo: Eppure si muove ... und sie bewegt sich doch ... kaj tamen ĝi sin movas. Jen vortoj, kiujn elvokis la granda sciencisto GALILEO GALILEI antaŭ pli ol tri jarcentoj. Kial tiajn obstinajn vortojn?

Estis tiam la epoko de la homa evoluado, en kiu la homa mondpercepto estis transiranta de la geocentra al la heliocentra mondpercepto. Ekde la plej antikvaj tempoj dum jarmiloj la homaro firme kredis, ke la tero senmove kaj fikse staras en la universo. La suno, la luno kaj la steloj rondflugas ĉirkaŭ la tero. Sur tiu ĉi percepto tiam bazigis ĉiu religio, la moroj, ĉiu scienca disciplino. Ĝi sajnis sankta al la tuta homaro. Sankta estis por ĉiu homo, por ĉiu popolo, la kredo al la senmova tero. Jen la mondpercepto geocentra.

Venis Kopernikus, venis Galilei kaj aliaj viroj de la scienco, kiuj kuragis skui la fundamenton de la genera la sankta kredo, kiuj malsanktigis la tradician antikvan kredon. Ne estas vere, ili asertis, ke la tero staras senmove. Tute ne! Sed la suno staras fikse en la universo kaj la tero same kiel la aliaj planedoj rondflugas la sunon. La tero sin movas! Jen la mondpercepto heliocentra.

Tute kompreneble, ke la tiamaj homoj, eĉ la eklezio, kiu ekvidis dangeron al la homara paco, kaj ankaŭ granda parto de la sciencistaro malŝatis tiun novan, revulucian instruon. Oni admonis Galilei kaj malpermesis al li, disvastigi siajn novajn "malĝustajn" instruojn. Oni persekutis lin, oni punis lin, oni eĉ minacis lin je lia vivo. Tiam naskiĝis la famaj vortoj: "Eppure si muove".

Nun, post 300 jaroj, "ĝi sin movas", eĉ ĉiu simpla homo tion scias kaj neniu plu kontraŭdiros al tiu fakto. Hodiaŭ oni admiras la grandan Galilei, neniu persekutas liajn adeptojn, nur la vortoj restis famaj. Kaj tamen ĝi sin movas. Nun la homoj estas ja multe pli sagaj ol en tiamaj tempoj kaj estas nun fieraj pri sia sageco.

Sed, ĉu vere la nuntempaj homoj estas multe pli sagaj? Ĉu eble pli felicaj? Ofte oni aŭdas homojn ĝemadi, ili plendas la sorton; car ili estas naskitaj en malfa-

vora epoko. car ili devas suferi la plej grandajn mondmilitojn kaj mizerojn ĉiuspecajn. Ne estas eble atingi veran, felicigan pacon. Kial do? Kiu kulpas? Kiu estas saga?

Ĉu la nuna homaro pli bone majstras sian tempon? Ĉu la nuna homaro pli bone konas la urgajn postulojn de sia tempo?

Oni konsideru nian epokon pli profunde kaj oni konstatos, ke pro la grandega progreso de la tekniko dum la lasta jarcento plene transformiĝis la mondo kaj ĉiuj homaj vivkondiĉoj. Dum nur unu jarcento la mondo aliiĝis tiom grave kiom neniam dum antaŭaj epokoj de la mondhistorio. Sed la homaro ne montris sin kapabla animeakordiĝi al la evoluo de la tekniko. Jen bona ekzemplo. En la antikva oriento, 2000 jarojn antaŭ Kristo, vivis la granda rego Hamurabo de Babilono. Kiam la granda Hamurabo bezonis lumon post la vespera krepusko por sia stata laboro li bruligis olean lampon, kiu pli odoraĉis ol lumigis. Kion faris Goethe 4000 jarojn poste kiam li bezonis lumigadon? Ankaŭ li bruligis olean lampon simile kiel Hamurabo. Ankaŭ la lampo de Goethe odoraĉis kaj malbone funkciis kaj Goethe gemis foje en sia poeta maniero:

> Wüsst nicht, was sie Besseres erfinden könnten,
> Als dass die Lampen ohne Putzen brennten.
>
> (Ĉu ili inventus plibonon por lumo
> ol lampojn brulantajn sen mec' kaj sen fumo?)

Jen progreso post 4000 jaroj! Kaj nun, post nur unu jarcento? La elektraj lampoj lumas, ne devante esti senfulgigataj.

Hamurabo same kiel Goethe, kvankam disigitaj per 4000 jaroj, ne havis alian rimedon por sendi sciigon 50 km malproksimen: ili devis sendi rajdantan kurieron. La ĉevalo estis la plej rapida transportilo por sciigoj, la plej rapida vojaĝilo - kaj nun, nur unu jarcenton poste? Kiel ege transformiĝis la cirkonstancoj! Hodiaŭ vi povas legi en la jurnalo tion, kio okazis nur hieraŭ sur la alia flanko de la mondo. Ni komparu la nuntempajn vojaĝkondiĉojn ktp. Kiel malgrandiĝis la distancoj inter ur-

boj kaj landoj, kiel intensiĝis la rilatoj inter la diversaj popoloj, sed la diverseco de la multegaj lingvoj restis, farigante pli kaj pli malhelpa, cagrena malfacilaĵo. Ju pli da rilatoj inter la popoloj densigas per modernaj komunikiloj, des pli urga farigas konvena rimedo por forigi tiajn lingvajn malfacilaĵojn, kiuj kaŭzas ĉiam nur malpacon. Ne la hazardo, ne la homa fantazio alportis la ideon pri komuna mondlingvo, sed la novaj kondicoj devige trudis al la homaro en la lasta jarcento tian komunan lingvon, kia estas Esperanto. La tempo kun siaj kondicoj naskas laŭtempajn aperajojn. Esperanto ne estas produktaĵo de fantaziulo, ne estas utopio, gi estas natura ido de la jarcento. La tempo estis matura kaj Esperanto naskiĝis. Jen la simpla fakto!

Kelkaj samideanoj malpaciencigas, konsiderante, ke la Esperanto-movado daŭras jam 60 jarojn. Kaj kion ni atingis ĝis nun? ili riproĉe demandas. Mi diras al ili: Ne plendu, sed estu konvinkitaj, ke ni iras la ĝustan vojon kaj pripensu, ke ni devas kontraŭbatali la plej obstinan forton de la homaro - la inertecon. Tiu ci batalo postulas persistemon, paciencon kaj esperon. Ne laciĝu do, ne perdu la esperon, ne perdu la kuragon, restu fidelaj al la movado kaj ĉiam pensu obstine kiel la granda Galilei: Kaj tamen ĝi movas sin!

(Malferma parolado de LKK-prezidanto Oskar SINNER dum la nunjara Esperanto-kongreso en Vieno.)

N i a k o n g r e s o e n V i e n o

En la vico de la alternantaj kongresurboj akceptis ĉijare pentekoste Vieno la 4-an Aŭstrian Esperanto-Kongreson sub la protekto de la instruministro d-ro Felix HURDES, de la urbstro de Vieno, d-ro Theodor KÖRNER kaj de general-poŝtdirektoro d-ro Karl DWORSCHAK en salonego de la grandrestoracio "Dreherpark".

La 27an de majo posttagmeze vizitis multaj kongresanoj la famkonatan Internacian Esperanto - Muzeon en la iama Imperiestra Kastelo. Ili afable estis salutataj de la fondinto kaj direktoro de la E-muzeo, kortega konsil-

anto Hugo STEINER. S-ano Steiner en parolado donis superrigardon historian pri la estigo de la muzeo kaj ties por la E-movado grava literatura kolektajo, enplektante memorigajn vortojn pri sia kunhelpinto s-ano Gustav WEBER, dummilite mortigita kiel Esperantomartiro de Gestapo. LKK-prezidanto majoro O. Sinner dankis nome de la Esperantistaro al kort.kons. Steiner por lia vivlaboro kaj finante sian paroladon li inaŭguris bildon de la muzeofondinto sub aplaŭdo de la gevizitantoj.

Vespera okazis interkonatiga arango en la kongresejo, kiun muzike beligis tramista orkestro. Malnovaj konatoj el la liglandoj kaj el Vieno renkontigis, aliaj gesanoj konatigis kaj regis atmosfero de harmonia amikeco.

Dimance la 28-an, je la 9a horo plenigis la gekongresantoj la "Herz-Maria" -pregejon proksiman al la kongresejo kaj auskultis bonegan predikon de P. Bruno HEBENSTREIT el Graz, kiun poste parolanto dum la kongresdiskutoj nomis "melodion por la koro". La pastro la meson celebris nur en Esperanto kaj ankaŭ la pregejaj kantoj sonis en la lingvo internacia.

Je la 10-a okazis la solena inaŭguro de la kongreso per la LKK-prezidanto, majoro O. SINNER. Li povis sub aplaŭdo de la kongreso saluti altrangajn honorgastojn. Kelkaj letere salutis la kongreson kaj senkulpigis sin pro malhelpo. Ĝoja aplaŭdo dankis al la urbestro de Vieno, d-ro KØRNER, kiam li salutis la kongreson kaj deklaris, ke li taksas la E-movadon grava kaj gin volonte subtenas. Kiam la reprezentanto de la instruministerio, sekcia konsilanto d-ro M. FÜHRING, la reprezentanto de la cefepiskopo kardinalo d-ro INNITZER, ordenkomandoro P. Georg PLANK, la reprezentanto de la Viena urba lernej- konsilantaro, distrikta lernejinspektoro SPITZER, la reprezentanto de la Teknika Altlernejo, prof. d-ro SIRK, mem en Esperanto alparolis la kongreson, faris tio profundan impreson precipe al la neesperantistaj gastoj kaj pruvis al ili, ke Esperanto enpenetris jam en altrangajn societajn rondojn. Aplaŭdegon rikoltis modela E - parolado de la Viena urba konsilanto Franz JONAS, kiu interalie akcentis, ke Esperanto kaj la E-movado mem nur povas flori kaj prosperi en statoj kun vere demokrata konstitucio.

Ankaŭ la Aŭstria Sindikata Ligo estis reprezentata

de la referanto F. SENGHOFER. La kongreson salutis ankaŭ diversaj aliaj reprezentantoj kaj esprimis siajn bondezirojn.

Posttagmeze okazis laborkunsidoj de la katolika, socialista, komunista kaj SAT-fakgrupoj, en kiuj estis diskutataj ties specialaj organizaj aferoj. Krome okazis fakkunsido de la Aŭstria E - instituto kun tre interesa referato de la institut-sekretario, s-ano E. WERNER.

Je la 20a "Viena Vespero" denove kunigis la kongresanojn kun varia kaj amuza programo kaj fine la kongreso dancis laŭ valsaj kaj modernaj ritmoj sub la melodiaj akordoj de la orkestro.

La 25an de majo okazis la ĝeneralkunveno de AEF, en kiu estis funde pritraktataj ciuj aferoj de la tutaŭstria E-movado. La memorigajn vortojn de la AEF-prezidanto ekseministro d-ro Hans FRENZEL, honore al la mortintaj s-anoj AHLGRIM (Vieno) kaj SASSMANN (Linz) kaj al ĉiuj ges-anoj, pri kies forpaso la estraro eble ne havas scion, la ĉeestantaro de la ĝeneralkunveno starante aŭskultis. Interesaj estis la relative amplekaj raportoj de la landestroj el la federaciaj landoj, kiuj elmontris, ke tie estas laborate por la movado diversmaniere malgraŭ multaj malhelpoj. Precipe Supra Aŭstrio (s-ano NIGL), Stirio (s-ano EDER), Tirolo (s-ano Hans STEINER) kaj Vieno (s-ano VOKAL) povis raporti pri konsiderinda agado. Sed ankaŭ ĝi la raportetoj de la aliaj landaj delegitoj oni powis ĉerpi la impreson, ke laboro prosperanta estas farata laŭcirkonstance.

Pri la financaj aferoj de la organizo referis la kasistino, s-anino Maria LOIBEL. El la bilanco por 1949-1950 ni koncize notas:

ENSPEZOJ:

Saldo 30.6.1949	ŝil.	1.000.50
Kotizoj 1.7.49 - 31.5.50	"	8.166.55
Donacoj diversaj	"	612.17
Subvencioj de instruministerio por la vortaro-eldono	"	1.000.--
Subvencio de la Laborista Ĉambro por la vortaro-eldono	"	1.500.--
sumo	ŝil.	12.279.22

ELSPEZOJ:

Luo, lumo, purigado de la sekretariejo kaj kompensoj por diversaj laboroj en la Centro	sil.	3.346.90
Novinstalo de la telefono kaj ties uzkostoj	"	1.123.56
Afrankoj, sekretariejaj materialoj, presajoj ktp.	"	2.123.67
Impostoj	"	261.10
50% de la subvencio por la vortaro "Deutsch-Esperanto"	"	1.250.--
Kostoj de la Aŭstria E-revuo	"	3.304.34
Saldo 31.5.1950	"	869.65
sumo	sil.	12.279.22

Al demandoj de s-ano d-ro HALBEDL (Knittelfeld) kaj NIGL (Linz) pri detaloj el la kasraporto la kasistino kontentige respondis. Poste raportis por la kontrolkomitato s-ano BERDAN, ke la kaslibroj kaj ĉiuj al ili rilatantaj fakturoj refoje estis kontrolataj kaj ĉio estis trovata en bona ordo kaj la bilanco estas gusta. La kasistino eĉ meritas multan dankon pro sia laŭfaka librotenado. Tial s-ano Berdan proponis al la anaro de la ĝeneralkunveno, ke ĝi esprimu al la kasistino kaj al la eksiganta centra estraro la sensarĝigon. Tiu propono sendiskute kaj unuanime estis akceptata. Je la goja aklamo de la ĉeestantoj knabeto transdonis al s-anino Loibel bukedon da rozoj kiel apartan dankesprimon de la E - kluboj "SUNO" kaj "KALOCSAY - LABORO".

Kiam s-ano LOIBEL por la balotkomitato submetis al la kunvenanoj la liston por la novelektotaj kandidatoj de la nova AEF - estraro, gi estis kun aplaŭdo unuanime akceptata. La centra estraro por la agad-jaro 1950/51 konsistas el jenaj ges-anoj:

Prezidanto: eksministro d-ro Hans Frenzel; vicprezidantoj: sekcia konsilanto d-ro Maximilian Führing, direktoro Paul Glüxmann, magistrata ĉefkonsilanto d-ro Leopold Grimme; afergvidanto: kalkulsekretario Raymund Čech; kasistinoj: Maria Loibel, Olga Wratny; sekretarioj: Alfred Berdan, Marianne Schuh; estraranoj: Josef Eder (Graz), fakinstruis-

to Franz Fötinger Ssalzburg), prof. d-ro Ernst Josef Görlich (Vieno), d-ro Adolf Halbedl (Knittelfeld), Franz Haiderer, ing. Robert Hartwig, Gabriel Katzianka, Hugo Kraus, Friedrich Mosek, Walter Mudrak, (Vieno), Karl Nigl (Linz), Robert Novacek (Vieno), Hans Steiner (Kirchbichl), Ferdinand Stöckl, Emil Vokal, Ernst Werner (vieno); kontrolkomitato: Franz Baumgartinger (Salzburg), fakinstruisto Franz Jeitler (Vieno), Johann Schwarz (Felixdorf), Maria Zajicek (Vieno).

La propono de la AEF-estraro pri ioma plialtigo de la membrokotizo por la Centro, por ke ĝi pli bone povu plenumi diversajn dezirojn flanke de la aligintaj grupoj, de ĉiuj diskutantoj estis malakceptata pro la nuntempa malbona stato financa generale. Sed oni konsentis la proponon de s-ano GLÜXMANN, ke la nuna kotizo de sil. l.-- por la Centro estu nura minimum-kotizo kaj ĉiuj ges-anoj pli bonstataj libervole plialtigu sian kotizon por AEF, por ke ĝi povu plenumi la necesan minimum- agadon. Diversaj aliaj proponoj estis diskutataj kajla centra estraro estis komisiata pritrakti kaj plenumi ilin laŭ la esprimita deziro en la generalkunveno.

Je la 18a vespere fine la tagordo estis elcerpita kaj prezidanto d-ro Frenzel povis fermi la generalkunvenon kaj la 4an Aŭstrian Esperanto-Kongreson kun kora danko al ĉiuj partoprenantoj pro ilia disciplino kaj longa kunvenpersisto.

Ankaŭ la kongreso en Vieno do pasis en plena harmonio, kvankam regis pri diversaj aferoj partigitaj opinioj. Tamen per bona volo oni ĉiam trovis la mezan linion. Tio estu por ni signo, ke ni per komuna kaj persista laboro supervenku la nunan krizan periodon, por ke ni povu denove forte antaŭenpuŝi nian E-movadon, kiam ankaŭ internacie la atmosfero de reciproka kunlaboremo de la landoj inter oriento kaj okcidento estos pli bona kaj pli fidema. Tiamaniere ankaŭ ni liveras nian kontribuaĵon por la ideo de la paco kaj amikeco inter ĉiuj nacioj tutmonde.

Alfred Berdan.

Post kongreso la danko

Tutkoran dankon al vi,karaj gesamideanoj partoprenintaj la kongreson. Per via ĉeesto vi kontribuis al la sukceso de l' kongreso, al bonamuzo, al interamikiĝo, al homara interkonsento,al monda paco. Estu kaj restu pacaj batalantoj kaj ankaŭ poste anariĝu fidele ĉe la Verda Standardo, kiam ĝi vokas vin al la paca batalo,por ke ni venku en gloro.

Humilan dankon al la altestimataj protektoroj, sinjoro ministro d-ro Felix Hurdes, en ties anstataŭo al sano dro Führing; sinjoro urbestro dro Theodor Körner kaj sinjoro ĝeneral-postdirektoro dro Karl Dworschak,en ties anstataŭo al sinjoro dro Engelmann.

Decan dankon al lia episkopa moŝto, al pastra moŝto Bruno Hebenstreit, kiu predikis emocie en la pregejo.Koran dankon al ĉiu aperinta gasto.

Mian plej sinceran dankon al nia ŝatata AEF-prezidanto, ekaministro dro Hans Frenzel, kiu ĉiam estis tre favora al nia afero dum la prepara tempo, ĉiam kompleza kaj preta je helpo. Koregan dankon.Kaj same koregan dankon al samideano dro Grimme.

Sed kian dankon mi esprimu al la du plej laboremaj, diligentaj komitatanoj,gesamideanoj Marie Loibel kaj Raimund Cech? Mi ne trovas la ĝustan vorton,ĉar tia fervoro, tia dediĉemo superas ĉion. Ĉiuj komitatanoj unuanime kunhelpis kaj meritas tutkoran dankon.

Sinner.

K r i z a n t e m o

Hugo Kraus

Mi estas ata floro
Surkampa, simpla nur,
Vivanta en la foro
De l' bela Dinatur',

Mi estas juna, ĉarma,
Kaj ridas el la kor'
Dum tempo suna, varma
Kaj dum vetera plor',

Sed se mi ŝajnas trista -
Gi estas nur erar':
Min ombras nur filistra,
La homa okulpar'.

Mi ĉiam ja serenas
Nur por gajigi vin
Kaj se vi iam venas,
En ko:' kunportu min!

K o n g r e s a j v o r t o j

El la kongresaj paroladoj ni citas sekve kelkajn ekstraktojn, ĉar ili montras la spiriton, de kiu estis portata la kongreso kaj ĉar ili estas direktivaj por nia vojo.

La redakcio.

S-ano eksministro d-ro Frenzel:

..... La kvara Aŭstria Esperanto-Kongreso sajnas al mifavora okazo por proklami la programan deklaracion de la tuta aŭstria esperantistaro. Ni kredas, ke la reciproka lingva nekomprenado kondukas al tio, ke la popoloj mis komprenas sin kaj la miskompreno estas unu kaŭzo de la negativajo.

Estas nun tiom da negativajoj en la mondo, ke oni povus preskaŭ supozi, ke la negativismo ekregis la mondon. La negativajoj efikas kiel infekta epidemio. La nekomprenado kaj miskomprenado inter la diverslingvaj nacioj transiras sur la samlingvajn homojn. Ofte ec la frato ne volas kompreni la fraton. Tio estas fiefiko de la epidemia karaktero de la negativajo.

Sed jen kaj jen ekagas homgrupoj, alportantaj ion pozitivan. Al tiuj pozitivuloj apartenas ankaŭ la Esperantistoj. Viroj kaj virinoj el ĉiuj partoj de la mondo konfesis sian partoprenon en internacia interkomprenilo. Tiu ĉi konfeso devenas el kompreniĝemo kaj tiu ĉi kompreniĝemo celas kaj ampleksas ne nur fremdlingvajn naciojn, sed ankaŭ la anojn de la propra popolo.

Ĉe la internaciaj kaj naciaj Esperanto - kongresoj oni spertas la maloftan fenomenon, ke diverseco de la mondkomceptoj, la diferencoj de la religioj, la malsameco de la sociaj pozicioj kaj la malegaleco de la lingvoj tute ne aperas kiel faktoroj disigaj.

Ĉiuj ĉi apostoloj de la lingva interkompreniĝo de la popoloj estas unuigitaj per unu ideo, kiu kondukas al libervola konkordo kaj konas nur unu celon: la celon, povi rekte interkompreniĝi kun ĉiuj popoloj de la tero. Al ili Esperanto ne estas memcelo, sed rimedo por efektivigi pacideon. Do Esperanto montriĝas kiel pacrimedo unuaranga; ne la timo je la atombatalilo j daŭre povos devigi al la paco, sed nur la reciproka komprenado, la

reciproka respektemo kaj la amo al la paco kaj libereco sen devigoj.

Esperanto aŭ alia lingva komprenilo sole ne sufiĉos por garantii daŭran pacon inter la popoloj, sed la rekta lingva interkompreno kontribuos al gi esence. .....

La urbestro de Vieno, d-ro Th. Körner:

..... Tio jen estas mia konvinko: Unu lingvo por la tuta mondo estas necesa! (Montrante al s-ano urbkonsilisto Franz Jonas) Mi nur povas bedaŭri, ke mi restis malantaŭe. La gepatra lingvo estis fiuzata por perforto kaj frakasado de kranioj ... mia sankta espero estas, ke la homoj post mi pli rapide saĝigos ol la epoko, kiun mi travivis. Ne perdu la kuragon, se vi havas firman konvinkon! Prediku en la dezerto! Se la homoj kapablos kompreni sin reciproke, ankaŭ la paco estos garantiita.

S-ano direktoro Glückmann:

..... La homaro komencas kompreni, ke ne povas esti ia izolita memfeliciĝo, sed nur feliciĝo en la komuneco kun ciuj, kun plena respektado de la proksimulo en la plej malgranda rondo de la familio same kiel en kolektivoj pli altrangaj kiel komunumo, stato aŭ popolo kaj, laste, de multaj au ciuj statoj kaj popoloj.

La tero malgrandiĝis, la tekniko venkis spacon kaj tempon kaj preparas sin, penetri en la spacon de la universo, dum ni baraktas por krei novajn regulojn de kunvivado en niaj malgrandaj kaj grandaj, terfiksitaj vivosferoj. Penega kaj stona estas la vojo al tiu ci celo, ho kiel nedireble malfacile estas, venki la egoismon de la individuo, de stato aŭ popolo, car devas esti cedataj tiom da enradikiĝintaj rajtoj favore al enordigo kaj ec subordigo al nova sistemo.

Devas denove triumfi la etika principo de l' vero kaj ni, kiuj kredas je gi, devas mobilizi nian tutan forton, por ke gi kaptu la potenculojn de la mondo kaj heligu ilian spiriton.

La lastaj jaroj estas plenigitaj de diversaj provoj atingi la necesan unuigon de la homaro. Je la unua loko estas salutindaj ciuj korporacioj de la Unuigintaj Naci-

oj, ĉiuj ĉi ekonomiaj, socialaj,kulturaj kaj sportaj internaciaj organizoj, en kiuj oni klopodas mildigi la ekzistantajn kontrastojn kaj trovi komunе ireblajn vojojn.

Mankas la plejgravajo: la komuna komprenilo, la komuna lingvo. Ĉu ne estas hontige, ke la ideo de interna-cia lingvo, naskita antaŭ 60 jaroj, ankoraŭ hodiaŭ devas lukti por agnosko? Simpla decido de UNO: ĉiuj membroŝtatoj kaj popoloj estas devigitaj realigi la ideon de Zamenhof. Oni instruu al la junularo en ĉiuj klerigejoj la simplan, klaran kaj krome belan internacian lingvon Esperanton; devigu ĉiun delegiton uzi en la internaciaj konferencoj kaj organizoj - post plej malfrue 2 jaroj tiu celo povas esti atingita - kaj mi kuragas aserti, ke per tio la unua granda sukceso estus jam akirita.

Tio ne kostus milionojn de dolaroj, neniu popolo,eĉ ne la plej malgranda, iel ajn igus dependa. Kontraŭe, tiam ili estos ĉiuj egalaj,-la plej grandaj kiel la plej malgrandaj.Tiam la delegitoj povos sen interpretisto mem "diri al la alia siajn verojn en la vizagon"kaj la popoloj, la simplaj homoj povos mem intersangi siajn pensojn kaj ekzameni propagandajn informojn pri ilia vereco. La propagandistoj hezitos diskomuniki falsajn raportojn, kiuj nur havas la celon malhelpi la konkordon inter la popoloj. La vero heligos la cerbojn kaj korojn kaj kapabligos ilin percepti la prudentajn kaj bonajn proponojn, kiuj kondukas al kompreno kaj al paco sur la tero.

Sed Zamenhof ne nur donis al ni per sia kreaĵo la ilon kaj la rimedon en la manon, sed li instruis al ni ankaŭ kredi je la bono en la homo kaj neniam perdi sŭ perfidi tiun ĉi kredon. Ni esperantistoj,kiuj volas servi al lia idealo, ni pruvas en niaj societoj praktike la toleremon, kiu kondukas de ĉiuj variaj ideoj kaj opinioj al tio, kio estas generale homa.

Karaj gesamideanoj! Tiuj ĉi pensoj devas plenigi niajn animojn. Por ili trovi novajn helpantojn, kunlaborantojn kaj amikojn devas esti nia celo.

SOCIALISTA ESPERANTISTARO

La ges-anoj de la socialista frakcio de AEF ricevis sekvantan leteron de la distriktorganizo Ottakring de

SPÖ, kiu montras, ke niaj socialistoj per la partopreno al la majdemonstracio de ilia partio sukcesis fari bonan propagandon por Esperanto.

"Karaj gekamaradoj! Vieno, la 4.5.1950.

Je la nomo de la distrikta estraro de SPÖ- Ottakring ni dankas al vi kore pro la partopreno de la laboristaj esperantistoj al la majdemonstracio de la distrikto. La k-doj per tio sincere dokumentis sian anecon al la Socialista Partio kaj samtempe esprimis sian interligitecon kun la socialistoj de la tuta mondo. Ni deziras al la esperantistoj, al la agantoj por la internacia lingvo, por ilia plua laboro ĝa plej bonan sukceson.

Amikecon!

La vic-distriktestro: subskr. La distriktestro: Karl Kysela."

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

AKLE, Vieno: leteradr. W.Mudrak, Wien 3., Beatrixg.19/9. Kunvenoj: I., Graben 13/I/II/25, ĉiun duan kaj kvaran mardon de la monato (17a-19a), ankaŭ dumsomere (19a-20a lingva perfektigo). "ESTONTECO", Salzburg: Domvikar J. KAPS, Salzburg-Parsch, Gaisbergstr. 7. Liglandaj sekretarioj: Stirio, Dr.A.HALBEDL, Knittelfeld, Schmittg. 15; Karintio, F. CASAR, Klagenfurt, Brunnplatz 3.

Sukcesaj kursfinfestetoj okazis en Vieno I. la 13an de junio, en Vieno XVI, la 28an de junio. La gelernantoj prelegis, deklamis, kantis.

Dum la kongresa Di-servo P. Bruno HEBENSTREIT OFM. celebris la s.meson kaj predikis en E. tre aktuale pri "La Sankta Jaro, jaro de la granda pardono". En vere franciskana spirito kun ardo kaj koreco li vokis al reciprokaj amo, kompreno, pacemo kaj pardono.

La fakkunsido de AKLE dum la kongreso estis prezidata de s-ano AKLE - prezidanto sekc. kons. d-ro FÜHRING. Ĉeestis 48 personoj, inter ili 5 pastroj. Raportis s-ano MUDRAK pri Vieno, d-ro HALBEDL pri Stirio (pli fortan subtenon eklezian petante), s-ano REITER pri Salzburg (menciante E - kurson de P. KAPS en Pastra Seminario), d-ro HOHENWARTER pri Karintio k.a. - Post vigla diskutado, en kiu ankaŭ partoprenis s-ano MOLL el Utrecht,

salutante nome de la katolika s-anaro nederlanda, oni decidis plue kunlabori en AEF. La katolikoj, kiuj devas pruvigi en la vivo privata, profesia, publika, plenumu ankaŭ sian taskon en la ĝenerala E-movado. Pluaj temoj estis: la XXIIa Kongreso en Romo (10.-17.VIII), "Espero Katolika", denove aperanta (abono por 1950 sil. 25.--, mendu ĉe AKLE). La kunveno finigis per esprimo de danko kaj sindonemo al la Ĉefpastro Viena, kard. mosto ĉefepiskopo d-ro Th. Innitzer, la ĉiam favora akcelanto de la Esperanto-afero.

FERVOJISTA FAKGRUPO

G r a n d a s u k c e s o
de la 2a IFEF - KONGRESO en Salzburg (17.-21.6.)

Laŭ la raporto, ricevita de la kongresa komitato, la 2a IFEF-kongreso en Salzburg estis partoprenata de 394 gekolegoj el 10 landoj. Vere varia programo, lerte kaj arte kompilita, ĝuigis la gastaron, kiu grandparte venis karavane el Danio, Nederlando, Francio kaj Germanio. Ĉiu trajno alportis multajn ges-anojn el diversaj nacioj, inter ili ankaŭ unu finnan kamaradon, s-anon HILTUNEN.

Dum la Interkonatiĝa Vespero gajigis la s-anaron la fervojista laboreja orkestro, la E. lernantaj infanoj, kiuj prezentis dancojn kaj kantojn sub la gvido de s-anino SELIGO. Grandan aplaŭdon ankaŭ rikoltis la kostumgrupo Jung Alpenland kaj jodlistino.

La kongresanoj vizitis la akvoartojn en Hellbrunn kaj samtage vespere, la 18.6. okazis en la granda salono de Mozarteum la solena malfermo de la kongreso. En la nomo de la OKK la afergv. prezidanto kol. STEIDL salutis la gastojn, inter ili s-ron ŝtatsekretarion Vinzenz ŬBELEIS, viclandestron s-ron Franz PEYERL, por la fervoja direkcio s-ron ĉefinspektoron K. HERANEK kaj kol. s-ron O. SEYFRIED, kiu reprezentis la urbestron kaj la ĉefon de la Fervojista Sindikato en Vieno, la landajn delegitojn kaj la kongresanaron. Li petis s-ron ŝtatsekretarion Vinzenz ŬBELEIS malfermi la kongreson, kiu per koncizaj vortoj akcentis sian ligitecon al nia afero. Solene eksonis la granda kaj bela orgeno, ludante la Esperanto-himnon.

Poste parolis viclandestro s-ro Franz PEYERL. Li akcentis la internacian valoron de E. kiel gravan kompremilon inter la popoloj. Ĉefinspektoro K. BERANEK (reprezentanto de la prezidanto de la Ligaj Fervojoj) salutis la gekolegojn je la nomo de la Fervoja Direkcio. Kiel landaj delegitoj parolis gekolegoj THORSTED (Danio), HILTUNEN (Finnlando), LEMONIER (Francio), SCHUCHMANN kaj BERGER (Germanio), BECKER (Nederlando), CARLSEN (Norvegio), unu s-ano por Svedio, KEISER (Svisio) kaj SIGHARTER kaj Zink (Aŭstrio). La kamaradoj el Italio alvenis la 19an de majo. En la paŭzoj inter la paroladoj la fama Mozart- kvarteto prezentis verkojn de Mozart. La vespero finiĝis per danco de Birthe NIELSEN, dana dancistino, kaj per orgenludo de la aŭstria himno.

La 19an salutis en la kongresejo, la senpage disponigita Laborista Ĉambro, kolego Ad. STEIDL la kunsidantojn kaj petis kolegon STAPEL transpreni la prezidon.

La raporto pri la laborkunsidoj ankoraŭ ne estas en niaj manoj (red.)

En Stieglkeller okazis samtage alplanda vespero. La kostumsocieto Alpinia montris originalajn alpajn dancojn kaj prezentis jodladon. Senlace la kongresanoj dancis. Regis intima kaj ĝojega atmosfero. Eksterprograme okazis sabate vizito de la interesa salminejo en Hallein. Tiuvespere la fervojista muzikistaro de Aarhus kaj la Salzburga orkestro fervojista kunigis en Mozarteum grandnombron da aŭskultantoj.

Dimanĉe la kolegaro surprizvojaĝis laŭ la devizo "Veturo en la verdon" al "La blanka cevaleto" en St. Wolfgang, Salzkammergut. La kongresanoj asertis, ke estis neforgesebla impreso por ili kiam sipe transveturinte la lagon ili estis atenditaj de muzikkapelo, kiu marsis antaŭ la kongresanaro tra la urbeto. Sur la placo atendis dua kapelo en minista kostumo kaj multaj ĉarmaj virinoj, kiuj portis orajn kufojn kaj belajn originalajn kostumojn, spalire gardis la vojon. El ĉiuj fenestroj la enlogantaro gaste salutis la verdstelanojn. La urbestro bonvenigis la anaron per kora alparolo. Tro rapide forpasis la bela tago kaj ĉiuj sincere bedaŭris, kiam kolegoj STEIDL kaj STAPL antaŭ la reveturo al Salzburg sur la stacidom placo de St. Wolfang oficiale fermis la kongreson.

En Salzburg la nederlandaj gekolegoj kantis honore al la aŭstriaj gekolegoj speciale verkitan kanton. La OKK kore dankas al ĉiuj landaj delegitoj kaj karavan-aranĝintoj pri iliaj klopodoj kaj, fine, al la kongresanaro pri ilia veno kaj komprenema konduto.

La lastaj vortoj estis: "Ĝis revido venontjare en Parizo!"

"Internacia vingustumado" en Weiden am See.

Post la IFEF-kongreso en Salzburg pli ol 200 eksterlandaj ges-anoj venis al Vieno.

La 23an la fakgrupo kondukis la tutan socieon al Weiden am See, Burgenlando, kie s-ano ZINK, ankaŭ ĉi-rilate la "kompetenta" aranĝanto, jam estis preparinta senpagan vintrinkadon por la alilandaj gastoj.

"La Distro"

"... 4 numeroj de la "DISTRO" jam aperis ..." anoncas mendilo por la eldonaĵo de la Viena Esperanto-Junularo.

La prezo estas por aŭstrianoj po n-ro sil.-.50, por alilandanoj 1 resp. kup. po 2 n-roj. Mendu en la E-Centro!

H. K.

ĈIUJN LIBROJN NUR PER "TRAMONDO", VIA LIBREJO!
Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)

* * *

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche: Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)
Druck: Hans Likan, Wien VI., Mollardgasse 85a.